

*El la polvo de la tero*  
de William Frederick Rolt  
Claude Gacond, 325-a radioprelego, 1969.12.31 & 1970.01.03

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Inter la nov-aperintaj libroj ni deziras hodiaŭ saluti la verkon de William Frederick Rolt : *El la polvo de la tero*, eldonita de Stafeto en la serio *Beletraj Kajeroj*.

A.- Tiu serio *Beletraj Kajeroj* kunigas poemarojn, novelarojn, dramojn kaj eseojn. Ĉar *El la polvo de la tero* estas nek poemaro, nek novelaro, nek dramo, Régulo Pérez ĝin verŝajne konsideris kiel eseon. Li eble pravas.

Cl.- Tamen se ni legas la difinon de eseon en la *Plena Vortaro de Esperanto* ni trovas :

A.- « *Mallonga literatura verko, en kiu la aŭtoro ne intencas funde pritrakti sian temon.* »

Cl.- Niaflanke ni opinias, ke la verko de William Frederick Rolt, se ĝi estas mallonga : centoj da paĝoj sen la aldonaĵo, kiu estas gravega, ĝi tamen intencas funde pritrakti sian temon.

A.- Kaj tiucele ĝi uzas riĉan vortaron, kie la neologismoj ne tro abundas, sed tamen ekzistas. Régulo Pérez vidis en ĝi literaturan verkon, ĉar stile ĝi estas agrablega. William Frederick Rolt ne kontentiĝis verki lernolibron, li faris iomete pli, li verkis lernolibron kaj sin submetis al stilekzerco. La rezulto estas verko, kiu estas facile legebla, kvankam la vortaro estas ege riĉa. Kaj ĝi estas legebla, eĉ se la grundo-scienco nin ne pasiigas.

Cl.- Pro tio ni opinias, ke William Frederick Rolt sukcesis en sia entrepreno, kaj ni fine komprenas, kial Régulo Pérez konsideris tiun lernolibron kiel eseon, ĝin vicigante en la rubrikon *Beletraj Kajeroj*.

A.- *El la Polvo de la Tero* estas enkonduko en la grundo-sciencan. Kaj ĉar ĝi ne kontentiĝis pri la lingvo, kiu sufiĉas por la klubaj babiladoj, sed bezonis pli riĉan, pli fakan, pli precizan lingvon, la aldonaĵo ludas ĉefan rolon.

Cl.- Tiu aldonaĵo estas vortareto por grundo-sciencistoj, sed ĉar la libro celas pli vastan legantaron, tiu vortareto helpas ĉiujn legantojn riĉigi sian esperantan vortprovizon. La nefakulo devus ĝin iomete konsulti antaŭ ol eklegi la esean parton.

A.- Tiu vortareto dividiĝas en kvar partoj. a) Grundo-sciencia vortareto ; b) Kemiaj elementoj ; c) Rokoj kaj rokaĵoj kaj ĉ) Mineraloj.

Cl.- La antaŭparolo al tiu vortareto nin atentigas pri la ekzisto de multlingvaj vortaroj, kiujn eldonas la organizaĵoj de Unuiĝintaj Nacioj. Tiuj multlingvaj vortaroj povas helpi la esperantistojn en la verkado de fakaj vortaroj. Jen ni citas lin :

A.- « *La jena vortareto [...] prezentas selekton de terminoj kaj difinoj el la Multlingva Vortareto de la Grundo-scienco eldonita de la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Nutrado kaj Agrikulturo (FAO) en kunlaboro kun la Internacia Societo de la Grundo-scienco.*

Cl.- *La unua eldono [de tiu vortaro], de 1954, enhavas la lingvojn anglan, francan, germanan, hispanan, italan, nederlandan kaj svedan. Posta eldono de 1960 enhavas ankaŭ la rusan.*

A.- *Tiaspecaj plurlingvaj vortaretoj, kiuj nuntempe plioftiĝas pro la kreskanta bezono por scienca komunikado tra la lingvaj bariloj, faciligas la elekton de la plej konvenaj fakaj vortoj por nia lingvo ; sed la plej granda avantaĝo estas, ke la konceptoj ligitaj kun la vortoj, se ne komplete samaj, estas tre similaj. Sekve oni evitas la facilaniman adopcion de internacia vorto, kiu eble havas malsaman signifon en pluraj lingvoj, aŭ alternative oni klare vidas, ke jam ekzistanta esperanta vorto bone taŭgas kaj ke neologismo tute ne estas bezonata.* » Fino de la citaĵo.

*El la polvo de la tero*  
de William Frederick Rolt

Claude Gacond, 325-a radioprelego, 1969.12.31 & 1970.01.03

Cl.- Tiuj diroj de William Frederick Rolt pravas, ke tiuj multlingvaj vortaretoj, kie esperanto ankoraŭ forestas, ne malfavoras la progreson de nia lingvo. Kontraŭe ili estas helpiloj, kiujn ni devus multe pli sisteme ekuzi, por gvidi la fakan vortfaradon.

A.- William Frederick Rolt faras alian rimarkon, kiu ŝajnas al ni gravega. Ni ree citas lin :

Cl.- « *La plejmulto de la terminoj uzataj en la grundoscienco estas ĉerpitaj el la aliaj sciencoj – geografio, geologio, biologio, fiziko, kemio, kaj tiel plu, - kaj ankaŭ el la komuna vortrezoro. Uzate en la grundoscienco ili ofte ricevas pliampleksiĝon, aŭ, alternative, limiĝon de senco ; do oni devus sin gardi kontraŭ la supozo, ke internacia akordiĝo pri la difino de unu vorto por la grundoscienco estas la signifo de tiu vorto.* » Fino de la citaĵo.

A.- Ofte la esperantistoj ne komprenas tiun fenomenon. Sed tamen, se ili pli atente ekzamenus sian nacian lingvon, ili povus konstati la saman fenomenon. Ekzistas ekzemple konvencioj inter familianoj por doni al vortoj pli larĝajn aŭ limigitajn sencojn. Kaj tiun fenomenon ili retrovus en esperanto.

Cl.- Nun okazas en Adelboden la esperantista ski-ferio. Ĉar la skiado kaj la migrado en la vilaĝo Adelboden estas la ĉef-okupoj, aŭtomate nia lingvo adaptiĝas al tiuj interesoj. Jaron post jaro oni vidas la samajn vortformojn reaperi. Kiam grupoj formiĝas matene, kaj sin pretigas al la foriro, oni aŭdas la interjekcion **ekal**, aŭ eĉ la proponon : **Ni ekalu!** Kaj la verbo **adelbodenumi** estas tuj komprenata de la nov-alvenantoj. Ĝi signifas : iri al Adelboden por rigardi la montrofenestrojn de la magazenoj, por babili en kafejo aŭ danci en kabaredo. Samaj bezonoj naskas fakajn vortojn. Tiun fenomenon ni retrovas legante librojn pri poezio, pri historio, pri geografio, pri pedagogio. La esperantistoj, kiuj ne komprenas tiun fenomenon, plendas.

A.- Malfermante poezian verkon ili plendas pri la neologismoj **kurta**, **frida**, kaj tiel plu.

Cl.- Malfermante la verkon *El la polvo de la tero* ili eble plendos pri la ekzisto de aliaj neologismoj, aŭ pri la uzo de radiko en pliampleksigita aŭ limigita senco.

A.- Sed fine, nenio devigas la esperantistojn riĉigi sian vortprovizon. La balbutantoj restu balbutantoj. Ili nur sciu, ke se esperanto progresas, tio estas ne dank'al ili, sed dank'al verkistoj kiel William Frederick Rolt, kaj poste dank'al la legantoj, kiuj ne nur asimilas la instruon de la verko - por la verko *El la polvo de la tero* tiu instruo estas enkonduko en la grundo-sciencan - sed kiuj ankaŭ asimilas la lingvon, en kiu tiu instruo estis donita.

Cl.- Tiurilate supraĵa rapida lego ne sufiĉas. Ni konsilas niajn geaŭdantojn aĉeti tiun libron *El la polvo de la tero* kaj provi, post atenta dufoja lego, pretigi prelegeton por la grupa loka kunveno. Pretigante tiujn prelegetojn ili asimilos la riĉan vortprovizon de tiu verko kaj ili samtempe tutcerte interesos la aliajn klubanojn.

A.- Pli kaj pli ni devas favori la eldonon de fakaj libroj. En 1970 la verko de William Frederick Rolt *El la polvo de la tero* ne nur devus esti aĉetita kaj ekspoziciita, ĝi devus esti studata.

Cl.- Tiel, iom post iom formiĝus legantaro kapabla legi librojn, kiuj iomete superas la kutiman kluban lingvon, kiu estas ĝenerale ege malriĉa.

A.- Jen niaj deziroj por la nova jaro.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-